# NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
Jesús Miguel García Iturrioz

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna(ĝis 30 jaroj): 20 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**JANUARO/MARTO 2020** **Nro. 122 (1/20)**




Nia kara amiko David Redondo, gvidanto de la kursoj dum la lastaj jaroj, pretigis tiun-ĉi belan afiŝon por reklami la novan kurson.

**LOKE ...**

## MORTIS JOSÉ LUIS BRINGAS.


Q. E. P. D.

José Luis Bringas Tellechea

Viudo Adelaida Pérez Aldecoa

Falleció en Bilbao ayer, día 14 de febrero de 2020, a los 85 años de edad.

Sus hijos, Joseba y Begoña Herrán; hermanos, Fernando, Mª Ángeles y Juan Mari; hermanos políticos, sobrinos, primos y demás familia.

**La despedida se realizó en la intimidad familiar.**

La pasintan 14-an de februaro mortis en Bilbao nia kara amiko José Luis Bringas Tellechea.

Naskiĝinta en Bilbao en 1934, filo de blinda esperantisto, li kontaktis unuafoje kun la bilbaoaj esperantistoj en 1957, post la tiama militservo.

Preskaŭ ekde la nova ekiro de la Grupo, li partoprenis en ĝia estraro: voĉdonanto en 1959 ĝis 1963; denove en la periodo 1966-70; Sekretario de 1971 ĝis 1975; Prezidanto de 1975 ĝis 1977; Vicprezidanto de 1977 ĝis 1981; kaj denove Prezidanto de 1990 ĝis 1992.

Samtempe li gvidis diversajn kursojn kaj, kune kun Pedro Benedicto, kampanjojn por diskonigi Esperanton inter diversaj bazlernejoj de Bilbao. Sekve de tio estis la organizado de kurso por infanoj.

Kune kun Larrouy kaj Altuna, ebligis la starigon de stando ĉe la internacia fojrejo de Bilbao, kie oni disdonis informojn pri la E-mondo.

Fine ni memoru lian prezidantecon de la LKK de hispana kongreso de la jaro 1989 kaj lia vicprezidanteco de la eŭropa kongreso de la jaro 2004, kiam sola sur la scenejo, komencis la kanton la “La Espero” pelante la aliajn kongresanojn agi same.

Laste, li estis la prezidanto de la Grupo de Bilbao de 2005 ĝis 2012.

Kaj ni ne forgesu la diversajn laborojn, kiujn li faris ene de nia sidejo: plumbisto kiu renovigis la necesejon, masonisto kiu riparis murojn, homo kiu pendigis portretojn, afiŝojn, meblojn, ktp. sur la muroj; samtempe, li kantis, ludis pianon, prelegis, faris spritajn monologojn, … li kapablis fari kion ajn. Krom ĉio-ĉi li estis unu el tiuj humilaj, bonkoraj, helpemaj kaj idealismaj homoj, kiuj abundas en Esperantio.

José Luis restos por ĉiam en nia memoro kaj en la historio de la Grupo Esperantista de Bilbao.



José Luis Bringas, dekstre, dum la hispana kongreso de 2010 en Santiago de Compostela.

Apud li, Eduardo Larrouy kaj Jesús M. García.

## UNU FOJON PLIAN …


Esperanto-Grupo
www.esperanto.net
Barrencalle Barrena, 7 - 1.º • Tfno. 658 70 90 87
48005 BILBAO
acia Loterio N°61.586
La posedanto de tiu ĉi kvitanco partoprenas per kvar (4,00) eŭroj, la numeron kies lotado okazos en Madrido la 22-an de Decembro 2019.
4,00 eŭroj (MON-DONACO: + 1,00 €)
0001
En caso de premio, este número estará sometido a los gravámenes que establece la legislación tributaria vigente.
Senvalora post 3 monatoj. Caduca a los 3 meses. 3 hilabeteren ondoren, baliorik gabea

Unu fojon plian ni trafis nenian premion en la tradicia hispana kristnaska loterio.

Tamen, pere de la 20%-donaco inkluzivita en ĉiu bileto, restis iom malpli ol 600 eŭroj kiel profito por la E-Grupo de Bilbao.

Ni kore dankas al ĉiuj kiuj aĉetis biletojn aŭ kunlaboris en ĝia vendado, tre speciale al tiuj amikoj el aliaj hispanaj regionoj, kiuj aĉetis pere de interreto kaj ludis kun ni niajn tute esperantigitajn kvitancojn.

## Z-FESTOTAGON.



La sabaton 14an de decembro, ĉirkau 20 homoj sekvis la alvokon de la E-Grupo de Bilbao por kunmemori la naskiĝtagon de la iniciatoro de Esperanto.

Ni komencis per spektado de 10-minuta tranĉaĵo de la fama vidbendo "Esperanto", de Roman Dobrzynski, kiu inkludis la finan kanton de "La Espero". Bedaŭrinde, la ĉeestantoj net ro emis kantadi.

Al tio sekvis spektado de alia filmo pri Esperanto en nia regiono, kies aŭtoro estas la filo de nia amiko Natxo Apaolaza; ege interesa filmo kiu enkondukis la ĉeestantojn al vigla debato.



Poste, okazis eta omaĝo al gelernantoj de la nuna kurso pere de disdonado de libroj kaj verdaj steloj. Bedaŭrinde, la instruisto malsanetis kaj ne povis ĉeesti la eventon.

Kaj, kiel tradicie, ni finis la kunvenon per komuna manĝado de la frandaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj, kio okazigis la renkonton de malnovaj konatuloj ćirkaŭ plenplena tablo.



Antaŭ la "oficiala" kunveno en nia sidejo, oni ankaŭ okazigis kunsidon de la "eŭskaj esperantistoj" ĉe vegetarana restoracio de Bilbao. Ili vizitis poste la straton Esperanto kaj por finigi la tagon, la plejparto ĉeestis la kunvenon en la Grupejo, kie finfine ni ĉiuj kunvenis.

Certe estis neforgesebla tago.

**LOKE ...**

## JAM SEP GRUP-ANOJ ALIĜIS AL LA KONGRESO EN COMILLAS.




Jam sep membroj de la Grupo de Bilbao aliĝis al kongreso de Hispana E-Federacio en la belega urbo Comillas (Kantabrio). Ĉu ankoraŭ estos pli?

Dume je la fermo de tiu-ĉi “Nia Ponto”, du monatojn antaŭ ĝia komenco, jam aliĝis 113 homoj al la kongreso, kio esperigas grandan sukceson.

## NIAJ KURSOJ DAŬRIGAS.



Dank’ al sindonemo de nia amiko David Redondo (dekstre sur la foto), daŭrigas la kursoj en nia sidejo.

Jen sur la foto kelkaj partoprenantoj en la konversacia rondo.

Kaj kiel aperas sur la frontopaĝo de tiu-ĉi “Nia Ponto”, la 28an de februaro ekis nova kurso por komencantoj. Ĝi estas speciale sukcesa ĉar aliĝis ĉirkaŭ 15 homoj.

**ATENTU!** Ek de tiu-ĉi jaro, al tiuj membroj de la E-Grupo, kies retadreson ni havas, ni sendos “Nia Ponto”-n nur elektronike (PDF). Se iu el vi deziras plu ricevi ĝin papere, skribu al la retadreso de la Grupo: esperantobi@gmail.com. Tiuj, kiuj ne havas retadreson, ricevos ĝin per normala helika poŝto.

**ATENCIÓN**: A partir de este año, a los socios del Grupo de los que tenemos dirección de “e-mail”, les enviaremos “Nia Ponto” sólo en formato electrónico (PDF). Quien quiera seguir recibiéndolo también en papel, que lo comunique a la dirección del Grupo: esperantobi@gmail.com. Los que no tengan dirección de e-mail, lo seguirán recibiendo por correo normal.

## Venontaj E-aranĝoj.

| | |
|---|---|
| 30 apr-04 maj | 79-a Hispana Kongreso, en Comillas (Kantabrio). |
| 11-18 jul | 76-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Someren (Nederlando). |
| 01-08 aŭg | 105-UK (Universala Kongreso). Montrealo (Kanado). |
| 22-29 aŭg | 87-a Itala Kongreso de Esperanto - en Asizo (Assisi). 25 jul-01 aŭg |
| 17-24 jul. 2021. | 106-UK (Universala Kongreso). Belfast, Nord-Irlando. |

Pliaj informoj pri E-aranĝoj en: http://www.eventoj.hu/

**H.E.F.**

## EKZAMENOJ KAJ KULTURO EN COMILLAS




La loka Kongresa Komitato anoncis ke ekzistas la ebleco prezenti sin al KER-ekzamenoj en la 79a Hispana Esperanto-Kongreso okazonta en Comillas, Kantabrio, komence de majo 2020. La ekzamenoj okazos nur se prezentiĝos minimuma nombro de aliĝintoj, do interesitoj bonvolu sin anonci kiom eble plej rapide ĉe la retpoŝta adreso de la kongreso: congreso@esperanto.es.

Kantabrio estas regiono kun rimarkinda tradicia kulturo. Ni konatiĝos kun parto de tiu, ekz. per la elmontro de dancoj kaj de la tipa keglo-ludado, unu el la plej popularaj sportoj en la regiono. Ankaŭ okazos renkonto kun kantabraj literaturaj verkistoj. Vidu la programon, kaj aliajn detalojn, en la retejo de KantEA. Vi povas informiĝi ankaŭ pri la postkongresa ekskurso laŭ la marborda Jakoba Vojo.
Ha!, kaj ni jam pasis la nombron de 100 aliĝintoj.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 63. 31/01/2020)*

## LIBRO "LA HISPANA TRAGEDIO".

Ana Manero informis ke la libro "La hispana tragedio", verkita de Jef Last pri siaj spertoj dum la hispana milito, kaj tradukita de la nederlanda laborista grupo, estas trovebla rete en Delpher, la bitoteko de la nacia biblioteko de Nederlando.
https://www.delpher.nl/nl/boeken/view?identifier=MMKB06:000000033:00007

ligilon en la koncerna rikordo de nia retkatalogo:
http://biblioteko.esperanto.es/cgi-bin/koha/opac-detail.pl?biblionumber=2848&query_desc=kw%2Cwrdl%3A%20hispana%20tragedio

*(Tonjo del Barrio. 06/02/2020)*

## NOVA KLUBO EN GRANADO

Granado estas urbo kie troviĝis esperantistoj sed kie ĝis nun, estante tipa universitata urbo, estis malfacile firmigi organizitan grupon. Nun fine venis la ŝanco.


La 26-an de januaro okazis la unua renkontiĝo de la Esperanto-Klubo de Granado. Ĉeestis kvar esperantistoj, kiuj pridiskutis la estontecon de la ĵus kreita klubo. Alejandro Burgos, juna studento, komitatano de TEJO, faros kurson por mezparolantoj kaj planas la starigon de kurso por komencantoj kaj por tiuj, kiuj nenion scias pri Esperanto.

Ni faras alvokon al aliaj granadaj esperantistoj, ĝis nun sen oftaj kontaktoj kun aliaj parolantoj, kontakti la grupon. Jen la adreso: granada@esperanto.ac.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 63. 31/01/2020)*

**H.E.F.**

## KUNMEMORO DE LA AKCEPTO DE RIFUĜINTOJ




En la jaro 2020 oni kunmemoras la centan datrevenon de la kampanjo ke la tiamaj hispanaj esperantistoj, precipe en Aragono, Valencia regiono kaj Katalunio, organizis por gastigi aŭstrajn infanojn, kiuj suferadis grandajn malfacilaĵojn post la fino de la Unua Mondmilito. Temis pri meritplena humaneca klopodo, kiu alportis helpon kaj ĝojon al pli ol 300 infanoj, ĉefe el la regiono de Stirio.

Laŭlonge de tiu ĉi jaro, diversaj instancoj, kaj ankaŭ Hispana Esperanto-Federacio, memorigos tiun ĉi notindan kazon de helpo al rifuĝintoj. Kiel ekzemploj de tiu memoro, oni povas legi rete la artikolon de Javier Alcalde en la portalo Ronda Somontano, pri Esperanto en Osko (Huesca), kaj apude en la bildo alian de Serafín Aldecoa pri la aktivado en Teruelo.

Ni memorigas ke, kiel ni jam informis la pasintan jaron en Bitbulteno 58, oni publikigis libron pri la sama akcepto en la valencia regiono, precipe en urbo Cheste. La titolo estas: "La trajnoj de la espero" (“Los trenes de la esperanza, Esperantistas solidarios: niños y niñas austriacos en la región valenciana”) kaj la aŭtoro, José Vicente Castillo.

Ni ankaŭ memorigas la diversajn verkojn pri tiu temo, kiun oni povas trovi en Esperanto, speciale tiujn verkitajn de la zaragoza aŭtoro Antonio Marco Botella.

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 63. 31/01/2020)*

## LA ESTRARO DE HEF KUNVENAS.



Jen simpatia foto de la HEF-estrarkunveno la 1an de decembro 2019. Mankas nur la prezidanto de la Junulara Sekcio (HEJS).
Cxar ili trovigxas dislokitaj tra la tuta Hispanio, kunvenojn oni okazigas en interreto, pere de la programo “Skajpo”.

## AŬTOMOBILA GLUMARKO.

En januaro, kune kun “Boletín”, ĉiu HEF-ano ricevis velan glumarkon por meti sur aŭtomobila vitro kaj propagandi nian lingvon.

Ĝi estis dizajnita de niaj laboremaj amikoj de la grupo de Teruel.

## TRA LA MONDO …

## Deklaro de UEA okaze de la 75-a internacia datreveno por la Holokaŭsto, 27 januaro 2020.




Hodiaŭ, kiam 50 ŝtatgvidantoj kaj delegacioj de la tuta mondo kunvenas en Yad Vashem por mencii la 75-an datrevenon de la liberigo de Auschwitz kaj la viktimojn de la Holokaŭsto, UEA omaĝas al la memoro de la milionoj kiuj estis mortigitaj pro sia genta aparteno kaj religio, inter ili ankaŭ multaj esperantistoj inkluzive de familianoj Zamenhof. En tiu tago, kiun la internacia komunumo mencias en la dato kiam estis liberigita la ekstermejo Auschwitz, oni memoru la pasintecon kun instruo por la estonteco, ke neniam plu homoj estu persekutataj pro sia religia, genta aŭ kultura aparteno kaj la homaro atente respektu la homajn rajtojn je libereco, interalie de kredo kaj lingvo.

*(Gazetara komuniko de UEA - Amri Wandel. Komitatano A de Israelo. 24/01/2020)*

Tute prave UEA omaĝis al la viktimoj de Holokaŭsto okaze de la 75-a datreveno de la liberigo de la koncentrejo Auschwitz. Tamen, mi estas malkontenta, ke ĝi limigis sin nur al la memoro de tiuj, kiuj estis mortigitaj "pro sia genta aparteno kaj religio". Per tio estis forgesitaj militkaptitoj, ciganoj, samseksemuloj, politikaj kontraŭuloj de naziismo, psikaj malsanuloj kaj handikapuloj, do ĝenerale homoj, kiuj laŭ la nazioj estis senvaloraj. Ilia ignoro -- espereble neintenca -- eĉ povas ofendi la koncernatojn.

*(Osmo Buller. 29/01/2020)*

## NECESAS IMPOSTO POR AVIADILA BENZINO (keroseno).

Ĉar flugi per aviadilo estas relative malmultekosta, ĉiam pli kaj pli flugas kaj la eligata $CO_2$ plihejtigas nian klimaton :(

Jen la retejo de Eŭropa Civitana Iniciativo (subskriboj validas nur por civitanoj de EU-ŝtatoj). Sed la temo estas tutmonda. Oni povas elekti el ĉiuj oficialaj EU-lingvoj:
www.endingaviationfueltaxexemption.eu/?page_id=725&lang=de

*(AVE-Asocio de Verduloj Esperantistaj. 18/12/2019)*

## PREZIDANTO DE EEU INTERPAROLIS KUN ANTAŬA ĜENERALA SEKRETARIO DE EŬROPA KOMISIONO.

Mi havis bonan 40-minutan konversacion kun Martin Selmayr pasintsemajne (antaŭa Ęenerala Sekretario de la Eŭropa Komisiono, nun ĉefo de la oficejo de la Komisio en Vieno).Ni komencis pri Eŭropa identeco, sed daŭrigis pri ebla rolo por Esperanto, kompreneble. Li montris grandan intereson, eĉ fotografis la libron de Ulrich Lins, “Die Gefaehrliche Sprache”, por mem mendi ĝin. Li demandis ĉu mi pretas gvidi diskuton pri Esperanto en la Komisiono en Vieno, kaj komprenble mi konsentis. Li petis min sendi al li la tekston de la Eŭropa Himno en EO, kaj tion mi faris. Li parolas tre bonan anglan, sed ni diskutis germane. Fine, li proponis ke ni uzu “Du” (ci) unu kun la alia.

*(Seán Ó Riain, Prezidanto de EEU. “Eŭropa Bulteno”. Nro. 199. Jan. 2020)*

# TRA LA MONDO …

## FILMETO PRI ESPERANTO SUBTITOLITA EN MULTAJ LINGVOJ.

Antaŭ kelkaj monatoj, la franca asocio de Eŭropo Demokratio Esperanto partoprenis la eŭropan baloton, per listo de kandidatoj. Por la televida kampanjo oni faris filmeton (en la franca lingvo) por reklami pri nia komuna celo, uzi Esperanton por faciligi rilatojn inter eŭropaj civitanoj. Ni forigis la finon, kiu petis voĉdoni por nia listo de kandidatoj, tiel ke tiu filmeto estas uzebla ekster baloto, kaj faris subtekstojn en ĉiuj oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio, kaj ankaŭ en Esperanto.

Tiuj 26 filmetoj estas videblaj en https://www.youtube.com/channel/UCYn83HDC-yBkMhPWb1mAlFw/videos. Ili estas libereuzeblaj.

*(Pierre Dieumegard. "Eŭropa Bulteno". Nro. 199. Jan. 2020)*

## Klimato-fonduso de UEA – kompensado de CO2-eligoj

Delonge UEA klopodas agordi al daŭrigeblo, diversaj prelegoj, ekz-e de la pasinta prezidento profesoro Mark Fettes demonstris ties neceson. Dum la UK en Lahti, laŭ la prelegoj pri la kongresa temo, venis la ideo kompensi la eligitan CO2 okaze de flugoj (principe ankaŭ de alvojaĝoj per aŭtomobilo ). Ja ekzistas organizoj, kiel Atmosfair.de, kiuj organizas plantadon de arbaroj.

De niaj geamikoj en kelkaj afrikaj landoj (ekz-e Tanzanio, Benin, DR Kongo) ni scias, ke ili jam komencis rearbarigajn projektojn en sia regiono. La avantaĝo subteni iliajn projektojn estas ke ĝi montros ke Esperanto ne nur parolas, sed ankaŭ agadas en daŭripova direkto.

Do, se vi partoprenas Esperanto-aranĝojn kaj devas flugi aŭ veturi per propra aŭtomobilo, bonvolu pripensi pri via kompensado.

Ekzemplo:

Atmosfair.de kalkulas ke flugo tien-reen Frankfurto-Montrealo-Frankfurto kaŭzos 2.500 kg da CO2 (en la simpla klaso); por tiu-ĉi vojaĝo de unu persono ili proponas kompensan pagon de 59 eŭro.

Fakte ankaŭ la uzado de propra aŭtomobilo (1 persono) kaŭzas simile multa da CO2. La diferenco en Eŭropo estas ke por benzino oni ja pagas impostojn, sed por keroseno de aviadiloj kutime oni ne pagas impostojn.

Nun eblas kompensi kaj samtempe subteni agadon de samideanoj (rearbarigo, renovigo de la UEA-domo ke ĝi bezonos malpli da energio)

Jen la UEA-konto: www.uea.org/alighoj/donacoj/co2

*(AVE-Asocio de Verduloj Esperantistaj. 31/01/2020)*

## Suda Sumatro: du insuloj estis definitive englutitaj de la akvoj

Nova signo de la klimata ŝanĝiĝo, du insuloj de la indonezia provinco de Suda Sumatro malaperis pro la leviĝo de la akvoj, laŭ la "Indonezia forumo por la Medio" (Walhi). La neloĝataj insuletoj nomataj Betet kaj Gundul situas nun je unu kaj kvar metroj sub la marnivelo.

*("Neniam milito inter ni". 18/02/2020)*